

kiu kontrolos. La lernejo pretas reklami la programon kaj donis permeson 'fanfaroni' pri ĝi en la nacia ĵurnalaro. Detaloj pri la projekto: <http://www.springboard2languages.org> .
Se ankaŭ vi ŝatus aliĝi al la Internacia Lingvolanĉilo Laborgrupo, bv. anoni vin ĉe zsafia.korody@esperanto.de

III. FILMO

"Gerda Malaperis"! La jam antaŭanoncita filmo estas preta
La filmon oni realigis pene, proprapoŝe kaj kun grava helpo de kelkaj afablaj esperantistoj kiuj apogis morale kaj finance la projekton. Ni invitas vin esti partoprenanto en tiu laboro. Ni invitas vin antaŭaĉeti almenaŭ unu ekzempleron de la filmo. Ĝi estas produktita en la formato DVD (libera regiono). Via aĉeto helpos prepari aliajn filmojn.
Por ekkoni la faratan laboron vizitu: <http://www.imagufilmo.org>

IV. KURSO

La E-grupo en Halle serĉas E-instruiston por „Eurocamp für Kids“ en Güntersberge (Harz) (<http://www.eurocampkids.com/2006/templates-de/start.htm>), kie inter 01-10. AUGUST 2006 kunvenos 280 partoprenantoj el 20 landoj. La organizantoj bonvenigus E-kurson. Jörg Gersonde subvencias eblan kurson per 60 EUR per Fondaĵo Mondo.

V. PREZENTADO

Dum la 83a Germana Esperanto-Kongreso Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto Centro prezentos per projekciado la centron, kaj informos detale pri la kleriglaboro kaj pri siaj diversspecaj servoj.

VI. STUDSESIO

La 30a Studsesio de Germana Esperanto-Centro okazos inter 16-18 junio en Herzberg. La unuan fojon estas en la programoferto intensa trejnado por tradukado (kun detalaj gramatikaj, stilaj konsiloj kaj kun multe da praktikaj ekzercoj)!
Perfektigu vian lingvoscion! Novaj studemuloj bonvenaj. Kotizo: 39 EUR (por gejunuloj sub 27 jaroj 100%a subvencio). Ni ofertas kaj peras favorprezan tranoktadon.
Aliĝo: esperanto-zentrum@web.de

Kun multaj salutoj:

Zsafia Korody
GEA-komisiito por instruado
zsafia.korody@esperanto.de